

TEA-BULTENO

1^a JARO



MARTO 1998

NUMERO 2



AGENDO



- 1 D
- 2 L Konversacia rondo
- 3 M Pri aktualaĵoj, sed... esperantlingve!
- 4 M
- 5 Ĵ Unuagrada kurso
- 6 V Estrarkunsido 
- 7 S
- 8 D
- 9 L Konversacia rondo
- 10 M Ni praktiku nian lingvon!
- 11 M
- 12 Ĵ Unuagrada kurso
- 13 V Ekskurso tra la vortaro: en kuirejo 
- 14 S
- 15 D
- 16 L Konversacia rondo
- 17 M Laboroj por Alp-Adria Konferenco
- 18 M
- 19 Ĵ Unuagrada kurso
- 20 V Eminentuloj en nia Movado (A. Altherr)
- 21 S
- 22 D
- 23 L Konversacia rondo
- 24 M Laboroj por Alp-Adria Konferenco
- 25 M
- 26 Ĵ Unuagrada kurso
- 27 V Laboroj por Alp-Adria Konferenco
- 28 S
- 29 D
- 30 L Konversacia rondo
- 31 M Laboroj por Alp-Adria Konferenco

VORTOJ DE LA REDAKCIO

Karaj Geamikoj!

Jam pasis alia monato kaj fulmrapide proksimiĝas la unua rendevuo, zorgita de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO.

Ĉu vi memoras pri kio temas? Tute certe ke jes, tamen por forviŝi ĉiajn dubojn aŭ miskomprenojn pri la loko, dato kaj temo, jen denovaj informoj:



10^a Alp-Adria
Esperanto-Konferenco
Lignano Sabbiadoro
8 - 14 aprilo 1998

Ties temo estas INSTRUADO DE ESPERANTO.

Ĝiakadre okazos Seminario por instruist/antoj kaj kurso por komencantoj, kies gvidado estas taskita al Stefan MacGill, fama esperantisto, verkisto de multaj lernolibroj kaj tre verva trejnisto. Li pritraktos diversajn temojn kaj i.a. prezentos kelkajn tiklajn demandojn, al kiuj li donos respondon ankaŭ per la helpo de la seminarianoj. El inter:

- ✦ Kiel eviti la fordrivadon de kursanoj? Kiel inkluzivi konojn pri la esperanta vivo en la kursoj?
- ✦ La Cseh-metodo: ĝiaj meritoj kaj mankoj. Kion valoran ĝi havas por ni? Kiom el ĝi nuntempe ni preferu ŝanĝu?
- ✦ Kiu estas la malfacilaj kaj esencaj punktoj de Esperanto?...

Sed Alp-Adria Konferenco ne estos nur momento por studi, por labori, por serioze seminarii sed ankaŭ momento por distriĝi, liberiĝi je la rutinaj ĉiutagaĵoj, kunestadi esperanto-etose kun malnovaj kaj novaj amikoj, ekskursi, dancadi freneze, kaj... Nu, aliĝu, partoprenu kaj, ĉio finite, vi mem aldonu, post la tri punktoj, kion ankoraŭ vi mem spertis kaj ĝuis en la mirinda turismejo *Lignano Sabbiadoro*!

Ho, preskaŭ mi forgesis: samtempe kaj samloke la Itala Junularo estas organizanta sian 22^{an} Internacian Junularan Festivalon, kun temo tre, tre aktuala: BUNTA EŬROPO. Do, tiam venu kun via tuta parenkaro: al ĉiu ni sukcesos havigi la plej komfortan kaj oportunan aranĝon!

Esperantlingva videofilmo pri Lignano!

Ĝi haveblas kontraŭ 10.000 liroj (+ ev. sendokostoj)
ĉe TEA-sekretario.

Kion vi scias pri la nuntempa situacio rilate al ekzistokaj egalec-raĵoj de la naciaj lingvoj en nuna Eŭropo? Legu atente la ĉi-suban artikolon de fama germana ĵurnalisto kaj... primeditu!



Angla lingvo komplete venkas en Eŭropa Unio

de Stefan MAUL

Laŭ nova studaĵo, kiu konatiĝis meze de januaro 1998, en instancoj kaj servoj de Eŭropa Unio (EU) nun klare unuan rangon de uzataj lingvoj tenas la angla, kiu forpuŝis de tiu loko la francan. La germana, plej granda lingvo ene de EU, draste falis sur la skalo, aliaj eŭropaj lingvoj ludas preskaŭ nulan rolon.

Oni analizis proksimume unu miliardon da dokumentaj paĝoj, kiujn tradukis la lingvoservo de EU-komisiono dum la pasintaj du jaroj. La rezulto estas: 42 elcentoj de tekstoj tradukitaj en aliajn lingvojn de EU (en kiu ja laŭkontrakte ĉiuj havas egalan rajton) venis el anglaj originaloj, 40 elcentoj el francaj originaloj, nur 6 elcentoj el la germanaj kaj nur 3 el hispanaj aŭ italaj. Tio do signifas, ke plimulto de dokumentoj estas verkita originale en la angla lingvo.

Dum multaj jardekoj, post la fonda de la unua eŭropa komunumo, tiu pri karbo kaj ŝtalo en 1951, kaj en posta Eŭropa Ekonomia Komunumo (fondita en 1957) la franca lingvo tenis tute klare la unuan rangon en ĉiuj komunaj instancoj kaj servoj. Eĉ post aliĝo de Britio en 1972 la franca restis la plej grava lingvo. Sed tio nun evidente pasis. EU-korespondantoj, kiuj raportis pri la menciita nova analizo, atentigas krome, ke jam delonge ankaŭ en interparoloj de ministroj, oficistoj kaj parlamentanoj de EU oni uzas preskaŭ nur la anglan, kiun scias ĉiuj; la germanan, ekzemple, regas preskaŭ neniu brito, franco kaj sudeŭropano.

Laŭ la raportoj, konkretiĝas ankaŭ onidiroj, ke la franca registaro - pro la evidenta venko de la angla - volas ŝanĝi sian lingvopolitikon kaj enkonduki en mezlernejoj kiel unuan fremdan lingvon por ĉiuj la anglan. Nun lernantoj povas elekti ekzemple ankaŭ la germanan kiel unuan fremdlingvon, sed tion faras nur ĉ. 10 elcentoj. La germana lingvo en Francio anstataŭis la iamajn elitismajn lingvojn, la antikvajn latinan kaj grekan. Laŭ analizoj, la germanan elektas la plej bonaj francaj lernantoj. Inverse, ankaŭ en Germanio (eĉ en regionoj najbaraj de Francio) nur ega malplimulto da lernantoj elektas la francan kiel unuan lingvon, ĉiuj aliaj la anglan.

Kelkajn semajnojn antaŭe, opinionda Instituto GAL-LUP enketis en 8 EU-ŝtatoj pri enkonduko de ununura oficiala lingvo de EU. La rezulto estis, ke 47 elcentoj kontraŭis la ideon, 48 estis por. Demandite, kiun lingvon oni preferus, se oni devus elekti oficialan lingvon, 86 elcentoj indikis la anglan, 65 elcentoj la francan, 47 la germanan, 30 elcentoj la hispanan kaj 21 elcentoj la italan.

En 4 landoj plimulto pledis por ununura oficiala lingvo: Italio (70%), Belgio (54%), Hispanio (53%) kaj Nederlando (51%). En la aliaj 4 landoj oni plimulte kontraŭas tian solvon: Francio (51% kontraŭ), Germanio (52%), Luksemburgo (54) kaj - oni miru! - plej forte Britio (65%). 64 elcentoj de ĉiuj enketitoj diris, ke enkondukon de ununura oficiala lingvo oni devus decidi per referendumo.

El nia mondo!

Malgraŭ la aĝo, ĝi tamen aspektas tre juna; malgraŭ la multaj survoje renkontitaj malfacilaĵoj, ĝi vigle kaj konstante iniciatemas; malgraŭ la ricevitaĵoj, ĝi ne haltas, male haste releviĝas; malgraŭ sia daŭra prikonsidero kaj atento de propra pasinteco, ĝi rigardas avide kaj larĝamense al estonto.

Nu, kiam ĝi naskiĝis? **La 28^{an} de aprilo 1908!**

Kiu ĝi estas?

Universala Esperanto-Asocio!

Sincerajn gratulojn, UEA, okaze de via 90-jariĝo kaj longan, sukcesoplenan vivon deziras tutkore TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO!

La tuta esperantistaro estas varme invitita ĉeesti la **Malferman Tagon** de la Centra Oficejo la 25^{an} de aprilo, por festi ĉi tiun gravan datrevenon: antaŭvidita riĉa programo, kun prelegoj de elstaraj gastoj, specialaj libro-ofertoj, teo- kaj kafo-gustumado, kaj - kio plej gravas - tutesperanta brila etoso!

Kie? En la UEA-nesto - Nieuwe Binnenweg 176 - Rotterdam!

Inaŭguro de Brusela Esperanto-Centro

La 17^{an} de februaro 1998, okdedo da entuziasmaj gesamideanoj tostis je prospera kaj fruktodona agado en la nova BRUSELA ESPERANTO-CENTRO.

La domon aĉetis kaj renovigis profund-idealisma brusela esperantisto, André Mertens Goossens, kaj nun ĝi estas je dispono de homoj celantaj efike organizi vigan aktivecon. Jam planitaj kursoj, kulturaj vesperoj por esperantistoj, akcepto de eĉ alilandaj prelegantoj kaj ankoraŭ multo pli.

Kaze de vojaĝo al Belgio, jen la adreso:

BEC - Bulvardo Leopold II, 176 - 1080 Bruselo; tel/fakso +322411775 aŭ rete: jorgo@agoranet.be

BULTENO de la membroj de
TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Sidejo: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
tel/fakso: +39 40 763128

Poŝta adreso: CP 601 - IT-Trieste Centro - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349